

# Tagiĝo 20

*Neregula cirkulero de Esperanto-Junularo en ĈRS.  
Eldonas Dům osvěty, odbor Esperanto, Opava – 1954/VIII,  
adr.: Kuzník, J. Rooseveltova 17, Opava*

## Kelkaj notoj pri Somera Esperanto-Lernejo 1954.

En la vico de Esperanto-lernejoj en ĈSR havs ĉi-jare sian honoran lokon ankaŭ Somera Esperanto-lernejo en la naturo sub tendoj en la valo de rivero Moravice, apud Žimrovice, - ne nur pro la impona nombro de partoprenantoj, sed ankaŭ rilate al la lingvonivelo kaj teknika organizo. Okazis tri etapoj 14-tagaj:

la unua estis dediĉita al la komencantoj. Parteprenis 22 gesamideanoj, plejparte el Opava, kelkaj el Olomouc, Kyjov kaj Lanškroun. Oni studis nur gramatikon kaj kelkaj horoj estis dediĉitaj al historio kaj literaturo esperantista. Fine de la etapo ĉiu submetis sin al la ekzameno resuma.

dua etapo konsistis el 29 gesamideanoj el diversaj lokoj de nia respubliko: Praha, Brno, Karlovy Vary, Děčín, Olomouc, Ostrava, Opava, Svitavy, Hulín, Svit. Ĉiutage al instruado estis dediĉitaj almenaŭ 3 horoj. Al privata preparo unu horo, sed ankaŭ la posttagmeza ripozo estis tiucele eluzita. Oni instruis: gramatikon, literaturon, historion kaj ideologion.

Antaŭlasta tago estis dediĉita al la ekzamenoj. La ekzamenojn ĉeestis ankaŭ samideano MAŘÍK el Praha, kiu partoprenis ĉi-jare anstataŭe de tri semajnoj. Oni komencis ekzameni je la 9-a matene kaj finis je la 20a horo vespere. Vespere estis solena transdono de la diplomoj al la ĉeestantoj, farita de s-ano Mařík, kiu taksinte la etapon diris, ke surprizis lin la atentemo, kun kiu estis la prelegoj aŭskultataj kaj la diligentecon de la tendaranoj dum la privata preparo. Ankaŭ koncerne la nivelon de la ekzamenoj li esprimis sian kontentecon.

tria etapo kun 17 homoj konsistis el gvidantoj de la grupoj. Ĉi tie oni parolis preskaŭ ĉiam Esperante. La programoj estis vigligataj de la prelegoj de s. Echtner kaj Mařík el Prana. Ĉefa diskuta temo estis, kiel organizi kaj gvidi la laboron de la grupoj en venonta jaro.

Resume mi povas diri: ju pli malbona vetero nin ĝenis dum unuaj du etapoj, des pli bona kolektivo formiĝis en tendoj kaj la gaja humoro ne mankis. Ĉar ofte pluvis, la akvo estis iom tro malvarma kaj oni ne povis sin ofte bani; ĉi tion anstataŭis pilkludoj kaj aliaj komunaj entreprenoj. La arbara aero nin dum 14 tagoj plene refreŝigis.

Rilate la manĝaĵon: kvankam la situacio pro viand-malfacilaĵoj ŝajnis esti malespera, tamen ni sukcesis plene kontentigi la ĉeestantojn.

La tendaro forte impresis la animojn de ni ĉiuj. Ĝi kreskigis la senton de la vera homa solidareco kaj entuziasmigis nin al novaj verdaj agoj. Kaj efektive la larmoj en la okuloj de tiuj, kiuj adiaŭis siajn amikojn, arbaron kaj tendaron – ne estis ŝajnigataj.

Ni ofte aŭdis: venontjare nepre ĝis la revido!!!

Aŭdi kaj vidi la kontenton de la partoprenantoj estas ja vera rekompenco por la aranĝintoj kaj organizantoj de la tendaro. KREDU, nemalmultaj estis zorgoj kaj klopodoj kun la tendaro kunligitaj. Por tiu, kiu ne provis la saman, ofte eĉ nekompreneblaj!

Pro la grandega laboro al tendaro mi volus danki al estro de la tendaro – Josef SOLNICKÝ. Nur dank' al lia organiza talento ĝi povis efektiviĝi. Ĉiujn malfacilaĵojn li venkas kun rido kaj bonhumoro! Danko apartenas ankaŭ al Irča kaj Eva – niaj kuiristinoj, al Geba, Guma, Vlasta K. Kaj al instruistoj.

Mi dankas al ĉiuj, kies merito estas, ke la tendaro tiom sukcesis!

Mi esperas, karaj tendaranoj, ke via entuziasmo elkreskinta en Žimrovice ne perdiĝos, ke vi reveninte hejmen, ne nur rememoros, sed fervore kaj precipe "fosos vian sulkon" kaj tiel plej klare pruvos, ke la tendaro kaj ĝiaj instruistoj sian taskon bone plenumis!

Vlano.

### Atentu gestudentoj!!!

Post dumonata ripozo komencas denove la studjaro. Multaj el niaj gesamideanoj transiras ek mezgradaj lernejoj al diversspecaj altlernejoj!

Ne forgesu, amikoj, ke en niaj universitataj urboj ĉie estas Esperanto-kluboj kaj ĉie ankaŭ niaj Junularoj. Ne preterlasu do la okazon daŭrigi la laboron en nia verda rondo!! Vi trovos tie amikan medion kaj gesamideanojn, kiuj estas pretaj helpi al vi en la komenco de via studado (kiu estas ofte eĉ amara) aŭ per konsilo aŭ eĉ per efika subteno.

Ofte estas malfacile trovi la kunvenejon de la grupo. Plej facile estas la afero solvebla, se vi sendos vian adreson al nia Centrejo – Opava, Rooseveltova 17, - kaj ĉi tiu transdonos ĝin al unuopaj niaj pewartoj en Praha, Brno ... kiuj vin informos pli detale!

Krom tio ni petas la grupajn delegitojn, kiuj elsendos siajn membrojn al altlernejoj, ke ankaŭ ili nepre skribu la adreson al ni!!

Ĉi-aŭtune ni intencas serioze organizi la laboron. Ĉiuj gesamideanoj do konscie partoprenu nian honoran klopodon! Ĝis la revido en niaj Esperanto-kunvenejoj!!!

Vlano

### La I-a letervespero de la JUNULARO en Olomouc.

La 31-an de aŭgusto 1954 aranĝis Esp. junularo en Olomouc letervesperon. Salutkartojn sendu al Naděžda Pokorná, J. Švermy 3, Olomouc.

Ni deziras al ilia vigliĝanta laboro multe da sukceso.

### TUTŝTATA KUNVENO DE ESPERANTO-JUNULARO La 1-an DE AŬGUSTO 1954 EN KASTELO EN H R A D E C apud OPAVA

Ni alportas la raporton pri la okazinta tutŝtata kunveno de junularo en Hradec apud Opava.

Jam sabate la 31-an de julio kunvenis el ĉiuj partoj de nia respubliko junularo kaj ceteraj gesamideanoj, kie ili ĝuis vere belan vespereton, kun la prodramo de Opava Junularo, de knabinoj el Brno kaj alie. Programo tre plaĉis al la partorenintoj.

Dimanĉe matene post la 9-a horo komencis la konferenco de Esp. junularo.

Ĉefdelegito de junularo s-ano-Kuzník bonvenigis ĉiujn partoprenantojn kaj taksis la signifon de niaj ĉiujaraj kunvenoj, poste tralegis la sekvan programon de konferenco:

1. Tralego de protokolo al kunveno de junulro en Lanškroun, la 13.12.1953.
2. Raporto de ĉefdelegito pri la rezultoj de konkurso de decembro ĝis junio 1954, kaj taksado de la laboro de junularaj grupoj. Plano de plua agado.
3. Raportoj de regionaj perantoj kaj de MEM junularperanto.
4. Elekto de plej aktiva grupo en ĉi jaro kaj dediĉo de memorflageto al ĝi.
5. Elekto de nova junularkomitato por jaro 1954-55.
6. Prelego de s-anoj Echtner kaj Mařík pri Esp. movado antaŭ kaj post la II-a mondmilito.
7. Diskuto, liberaj proponoj.
8. Fermo de kunveno per la rezolucio.

Post la konciza tralego de protokolo de la lasta junulara kunveno en Lanškroun estis alpaŝite al la taksado de la stato de nia laboro dum la pasinta tempo.

Li diris:

Nia junulara organizo en ĈSR eklaboris laŭ la nova sistemo, kaj ĝiaj rezultoj? Ni diru, ke estis farite sufiĉe multe, sed tute kontentaj ni ne povas esti. Kiel ni ekvidos ankoraŭ pli poste pri la rezultoj de poentado de unuopaj grupoj ni povas diri, ke multaj bone laboris, ĉefe grupoj, kiuj enviciĝis en la konkurson, sed estas hontinda, ke nur 8 grupoj konkursas, kvankam ankaŭ aliaj junularoj ne dormis kaj montris, ke ili kapablas ankaŭ vivi. Sed la kuraĝon konkursi kun la ceteraj grupoj ili ne havis. Pli bone dirite, ili ne trovis an sia kolektivo homon, kiu kapablus ĉiumonate sendi la raparton al la regionperanto, kaj tiel plenumi unu el gravaj punktoj de konkurso. Kvankam ili laboris, tamen ili staris flanke de nia movado, ĉar ni nur malmulte sciis pri ili, kaj repe ne konis iliajn malfacilaĵojn kaj ne povis helpi al ili.

Kio estis la ĉefa celo de nia konferenco? En kadro de diversaj aranĝoj de nia konkurso estis la ĉefa afero plialtiĝo de nivelo de lingvoscio de nia junularo. Jam ne nur kvanto, grandega nombro de membraro, el kiu verdire multaj ne nur ne laboris sed eble antaŭ ia tempo jam forlasis la movadon kaj grupon, sed ni preferas jam la kvaliton – pli malgrandan aron da aktivaj samideanoj, sed aron, kiu por nia movado pli valoras.

Nun ni povas jam raporti la rezultojn de konkurso inter junularaj grupoj en ĈSR, kiun ili partoprenis dum tempo de la 1-a de decembro 1953 ĝis junio 1954.

Jen la tabelo de konkurso. Numeroj signifas akiritajn poentojn:

#### Tabelo de JUNULARKONKURSO.

Skupina	docházka			kursy	lingvoscio	Hlášení			plán	premiové body			celkem		celkem	pořadí	
											II	I	I	II			
Opava	26	24	22	40	65	5	5	5	10	48	10	24	284	411	695	2	1
Ostrava	22	18	16	-	-	5	5	5	10	10	10	10	111	325	436	3	4
Chrudim	24	20	-	-	-	5	5	5	10	-	-	-	59	134	193	7	8
Lanškroun	14	20	10	18	35	5	5	5	10	-	-	15	137	198	335	5	7
Pardubice	14	16	10	-	90	5	5	5	10	-	-	20	173	193	366	6	6
Brno	24	24	22	-	-	5	5	5	10	10	50	37	192	454	646	1	2
Třebíč	26	24	24	-	165	5	5	5	10	-	-	20	284	301	583	4	3
Kroměříž	22	-	-	-	-	-	10	10	20	-	-	-	18	89	71	8	9
Praha	-	10	12	-	360	-	5	5	-	-	-	15	89	-	407	-	5
													-				

Kiel vidiĝas el la tabelo plej bone vizitadis grupon junularo Třebíč kun 74 poentoj, 2-an lokon havas Opava kun 72 poentoj, trian lokon Brno kun 70 poentoj.

En lingvoscio estas unua Praha, kun 550 poentoj, 2-a Třebíč 305 poentoj, 3-a Ostrava kun 210 poentoj, 4-a Opava kun 205 poentoj, 5-a Brno kun 185 poentoj.

En premiopoentoj entute gvidas grupoj Brno kaj Opava. El kio konsistas la premiopoentoj de tiuj ĉi grupoj? Opava: Eldonado de cirkulero estas plej granda fonto per poentado. Sed krom tio junularo Opava entreprenis dum la jaro multon da vesperetoj kun la esp. kaj alia programo, publikajn danifestojn, ktp. Tamen ne estas poentita la aranĝo de Esp. tendaro 1954. Ni diru ke la vivo de grupo dum tiu ĉi jaro ne estis jam tiel bona kiel en la pasinta, ĉar foriris el ĝi kelkaj aktivaj s-anoj, kiuj entute faris kompletan kolektivon. Sed tamen grupo vivis kaj ke ĝi estas kapabla aranĝi la tendaron, tio jam sufiĉe pruvas ke grupo vivas bone.

Premiopoentoj de Brna junularo konsistas plejparte el pli bone preparitaj kunvenoj - tio atestas pri la pli granda kulturnivelo de grupo. Aranĝado de diversaj prelegoj, preparado de valoraj vesperprogramoj, bonaj tradukoj de kantoj, teatraĵoj kaj ilia ludado antaŭ la klubanoj en Brno, tio ankaŭ atestas pri bona kunlaboro de junaj kaj malnovaj esperantistoj en Brno.

Ankoraŭ ni rigardu al la laboro de junulara grupo en Třebíč. Grupo konsistas plejparte el vere junaj s-anoj. Ni povas diri, ke multaj el ili estas infanoj. Kio estas la ĉefa afero en tiu ĉi grupo? Granda entuziasmo regas inter ili. Nur necesas, ke junularo Třebíč ankoraŭ pli profunde eklaboru

por Esperanto, necesas, ke vi pli esperantigu viajn kunvenojn. Ne nur kunveni, sed labori en senco de ideo de nia Majstro. Necesas, ke vi eduku inter vi pli da bonaj, fidelaj gvidantoj kaj poste ni estos plene kontentaj pri via laboro.

Ni faru ankoraŭ finan konkludon pri la rezultoj de nia konkurso. Mi povas diri, ke la konkurso povis esti ankoraŭ pli sukcesa, se aliĝus pli da grupoj al ĝi.

Kia estu do nia tasko? Grupoj, kiuj jam enviciĝis en konkurson, tie restu kaj serioze laboru, krom tio ĉiu el ni klopodu akiri la ceterajn grupojn por konkurso. Ni devas solvi la demandon pri la aktivigo de grupoj en Sudbohemia kun centro de Ĉ. Budějovice-Plzeň. Tie ĉi la agado estos vere iom malfacila, sed la ĉeloj disemitaĵoj ĉi tie estas kaj oni nur havas la taskon ilin kunmeti kaj plivigli. Repe perletere kontaktu kun izoluloj kaj plivigli ilin. Estas necese almenaŭ du grupojn alkonduki konkurson. Nombro 5 membroj por konkurso sufiĉas.

Dua tia regiono estas ekster Praha. Kiom da grupoj en tiu ĉi regiono estis dum pasintaj jaroj tiel viglaj. Hodiaŭ eĉ ne unu aliĝis por junulara konkurso. Kiu estas kulpa pri tio? Eble ian kulpon portas malnova repe por Praha, kiu eble pro manko de tempo kaj pro tio ke praha junularo komence de konkurso multe laboris pro diversaj malfacilaĵoj, s-ano repe ne zorgis ankaŭ pri sia regiono. Kiom multe estis farebla tie ĉi estas jam superflue paroli. Ĉi tie estas ekzemplo kion signifas la laboro kaj akrieco de repe. Li estas ĉenero de nia junulara organizo, kaj se tiu ne kunligas siajn grupojn, do poste ili perdiĝas kaj staras flanke de la organizo. Ni scias nenion pri tiuj grupoj. Sed certe ili ne mortis kaj eble ili estas sufiĉe viglaj. Nur mankis la volo kunligi ilin kun Centrejo. Kia do estas tasko por peranto de Praha regiono. Tuj post sia reveno hejmen li pere de personaj leteroj kontaktu kun la grupoj, elektu en ĉiu grupo iun aktivan s-anon, donu al ili siajn postulojn por plibonigo de afero, klarigu al ili la neceson kunlabori, entuziasmigu ilin kaj tiel envicigu ilin al la konkurso. Do tasko sufiĉe granda, sed vere plenumbla.

Kion faras ceteraj delegitoj? Peranto por orientbohemia laboris dum jaro sufiĉe bone. Li montris aktivecon kaj envicigis por konkurso 3 grupojn kaj en kelkaj li preparis la bazon por povi tiu ĉi jare la junularmovado en la regiono pli bone flori. Estas nur necese iom rigardi ankaŭ al la junularo en Hradec Králové, kie estis vigla grupo, ke tiu denove eklaboru. -- La tasko: En malviglaj grupoj elekti kapablajn organizantojn, transdoni al ili siajn postulojn (ne per cirkuleroj, sed perletere aŭ persone) kaj ĉie kie estas almenaŭ malgranda ebleco plivigli kaj plibonigi la situacion.

Moraviaj grupoj. Belan laboron montris s-ano Werner, kiu kun konstanta entuziasmo bone zorgis pri siaj grupoj en regiono. Lia plej bone ellaborita cirkulero bone informis liajn grupojn kaj la sukceso estas videbla. Tamen estas necese plivigli ankoraŭ kelkajn grupojn en kiuj almenaŭ iom formiĝas ia vivo. Kiamaniere tion fari? Mi pensas, ke s-ano Werner, se li restos plu repe, li scios tion organizi sufiĉe bone, al li ne mankas entuziasmo kaj kiel organizanto li estas kapabla. Necese estas vivi la movadon en Svitavy pere de s-ano Tichý, plivigli movadon en Kroměříž kun la kunlaboro de s-anino Halabalová el Hulín, iom rigardi ankaŭ al Gottwaldov, kie iam viglis junulara grupo kaj ankaŭ trovi ian ĉelon en ĉirkaŭaĵo de Hodonín-Břeclav. Regiona peranto el al laboro!

Kaj ankoraŭ restis la lasta regiono Ostrava-Olomouc. En la regiono laboras kelkaj junularaj grupoj, tamen en la konkurso estas nur du – Opava kaj Ostrava.

Olomouc laboras bone kaj nur pli bone kunlabori kun la reg. peranto. Aro de junaj s-anoj ekzistas ĉi tie kaj estus hontinda, se tia urbo kia estas Olomouc, ne povus ankoraŭ pli bone labori. S-anoj en Olomouc – ĉiujn fortojn al plibonigo de afero. Kiom multe estas da aktivaj malnovaj s-anoj en Olomouc. Mi petas ilin, helpu al ni – junularo – per konsiloj kaj per propra propagando – fariĝu instruistoj de junularo. Olomouc devas venontjare teni unu el la unuaj lokoj en la konkurso.

Kaj pri Přerov mi jam tute ne volas multe paroli. Kiel aktiva movado tie vidiĝas. Kiom multe da junaj homoj tie ekzistas. Kiel organizemaj homoj tie estas. Kaj tamen junularo trovas en sia rondo eĉ ne unu entuziasman s-anon aŭ inon, kiu kapablas vere iom junulare organizi nian movadon.

Ni formetu ian fierecon, aŭ ian falsan ideon ke ni ankoraŭ atendu ĝis ni estos ankoraŭ pli fortaj. Ni urĝe bezonas komune labori tuj, sen prokrastoj. Kion respondos al ni junularo en Přerov, ĉu ili plue restos kiel insulo de Robinson Crusoe? Fortaj ni estos nur tiam se ni kolektos ĉiun etan

laboron kaj formos el tio firman, de neniu jam rompeblan Esperanto-movadon.

Jen la tasko de regiona peranto. Kapabli konvinkigi Pŕerovanojn ke ili kunlaboru kaj ni nur kredis, ke iliaj koroj ne estos el ŝtono.

Plua tasko de repo estas enpenetri al s-anoj en Hranice, Prostějov, kaj Příbor kaj tio peti la malnovajn s-anojn ke ili helpu en la kreado de junulaj grupoj. Ví spertaj s-anoj, ĉu vi timas doni en multojn de junaj homoj la eblecon memvole decidi pri siaj programoj kaj agado? Ĉu vi pensas ke via agado estos malfortigita? Tio estus falsa supozo. Kredis, ke junularo devos iam transpreni vian gvidadon, donu al ili eblecon lerni ion organizi - donu al ili eblecon kompreni kaj fari la organizan laboron. Vi ekvidos ke baldaŭ ili estos viaj helpantoj, eble baldaŭ la esp. movado en via loko plivigliĝos. Komprenoble restu kun ili en konstanta kontakto, konsilu al ili, transdonu al ili viajn spertojn. Fordonu vian egoismon, pensu iom kolektive, kredis al junularo al iliaj ofte sanaj ideoj.

Repe ankaŭ enpenetru al s-anoj en Třinec, Karviná, Bohumín, Vsetín, Kopřivnice, provu sammaniere konvinki la esperantistojn pri neceso de Esp. junularo. Aŭ en tiuj lokoj ne naskiĝas junaj homoj, aŭ la malnovaj esperantistoj tute forĝesis akiri por la movado junularon, - ĉu ili interesiĝas nur pri la jam aĝaj - seriozaj homoj - ili ne sentas bezonon doni al la Klubo ian fiŝon-ezokon, ke ĝi iom aerumu jam tiel malodoran aeron, kia estas tie - nemoviĝanta eble jam multaj jaroj? Iom pli revoluciaj ideoj estos necesaj - pli da kuraĝo - ne atendi ĝis Esperanto venkos, sen tio, ke ni nur dormante atendas ĝis vekigos nin la brilo de verda stelo. Ĉi tie mi turnas min al la tuta esperantistaro eb ĈSSR, ke ili fine komprenu tian situacion, ili aprobu fine la neceson de juna generacio de nova sango en la movado, kaj pruvu tion per helpo - se vi povas jam nenion pli fari do almenaŭ varbu por diversmaniera propagando ĉefe junajn homojn en la movadon - ili certe restos fidelaj kaj agemaj.

Repe por reg. Ostrava laboris bone, sed eble mankis al ŝi pli da spertoj en organizado.

Lasta nia ĉapitro estas demando de Slovakujo - de slovaka junularo. Kiel longe tiuj du landoj Slovakio kaj Bohemio-Moravio laboros disige? Ĉu ni ne estas unu nacio kun rajtoj egalvalora? Ĉu Slovakoj ĉiam volas esti kiel perdita insulo en la maro? La delegitoj en Slovakio pripensu tion, ĉu estas neeble kunlabori? Vi estas sufiĉe granda lando kaj la Esp. movado tie estas neorganizita. Kaj tamen troviĝas tie fervojaj junaj samideanoj. En norda Slovakio - en Poprad, Svit kaj ĉirkaŭaĵo, kiel aktivaj grupoj, eldonantaj ankaŭ belan, legindan junularan cirkuleron Juna Voĉo. Kion vi faros ke ankaŭ en ceteraj partoj de Slovakio ekbrilu la verdaj steloj de junularo. Aktiviĝu kaj donu al ni amike viajn amikojn por kunlabori!

Mi ankoraŭ resumas miajn ĉefajn postulojn de repe kaj de lokaj delegitoj. - Vi, kiuj estas gvidantoj, via devo estas legi kiel eble plej multe da gazetoj kaj cirkuleroj Esperantaj, vi ĉiam devas scii kiel stas nia movado, kiel en la respubliko, tiel ankaŭ fremdlande, fare de tio vi devas entuziasmiĝi kaj tiun ĉi fervoron - entuziasmon vi transdonu pluen, al viaj grupanoj - informu ilin pri la sukcesoj de aliaj grupoj, kluboj kaj sukcesoj de Esperanto en tuta mondo. Via devo estas ankaŭ vizitadi ĉiujn entreprenojn de esperantistoj, konferencojn, kunvenjn - ĉar tie vi ricevos novan vervon por plua laboro, por kiu vi jam perdigas intereson. Vi ĉiuj gvidantoj de grupoj pridiskutu la junularan demandon kaj enviciĝu en la konkurson. Lokaj delegitoj havu senperan kontakton kun la repe, regule sendadu la raportojn pri la agado. Se vi havas malfacilaĵojn, petu helpon de repe kaj ankaŭ per oferemo kaj viaj propraj fortoj penu la situacion plibonigi.

Regionaj perantoj restu plej aktivaj, komprenu, ke via tasko estas plej grava; senĉese entuziasmiĝi la grupojn pere de viaj etaj cirkuleroj kaj pere de simplaj leteroj kaj personaj vizitoj. Konstantan kontakton vi ĉiam havu kun la ĉefdelegito de junularo, transdonu al li viajn novajn pliboniĝojn por la organizo, per krea kritiko postulu de li pli da agemo kaj vigleco. Mi neniam sentu nin ofenditaj pro kia ajn kritiko - se ĝi estas farata en intereso de Esp. movado.

Mi sendos al vi adresojn de s-ideanoj en lokoj, kie ne estas ankoraŭ junularaj grupoj. Vi kontaktu kun tiuj sanideanoj, petu helpon de ili en la formigado de junularaj grupoj.

Antaŭ ol ni alpaŝos al la elekto de novaj gvidantoj de nia junular-organizo kaj al la diskuto, ni volas ankoraŭ kelkajn vortojn diri al la ĉi jara somera Esp. tendaro en valo de rivero Moravice. Mi pensas ke, malgraŭ la multaj malfacilaĵoj, tamen la kursaro estis sufiĉe bone aranĝita, ĝia celo

estis vere instrui al junularo la neceson de Esperanto per konatiĝado kun historio kaj literaturo, ĝia celo estis ankaŭ pliperfektigo en lingvoscio, kaj montri al la kursanoj metotodojn de bona organizado de grupoj. Mi esperas, ke malgraŭ la malbona vetero - niaj junaj s-anoj estas kun la kursoj kaj vivo en la tendaro kontentaj, kaj ke post ilia alveno hejmen ili eluzos la ĉerpitan entuziasmon al vigla, nemortema laboro en sia junulara esperanto kolektivo. Neniu el vi restu flanke de la movado. Estu konsciaj ke la kursaro ne havis sencon nur de ia amuzripoz, sed de preparo de via aktiva laboro en viaj rondoj.

Nun sekvis raportoj de reg. perantoj, kiuj resumis la agadon de grupoj en sia regiono. Unuopaj grupoj jam jam ne raportas pri sia agado, do fare de reg. per. la raporto estis koncizaj kaj enhavis nur la necesajn sciigojn. La raportoj estis la resume de iliaj regionaj cirkuleroj.

Ankaŭ raporto de Junulara MEM delegito estis farifa, kie li taksis agadon sur tiu ĉi kampo kaj instigis junularon en estonteco pli intensive por MEM ideo labori.

Per tio finis la funkcio de ĉefdelegito de Esp. junularo en ĈSR kaj la provizoran funkcion dum la kunveno transprenis s-ano Kočvara Vlast.

Laŭ la akiritaj poentoj en la konkurso estis balote elektita la plej vigla Esp. junulara grupo, kiu estis Opava, al kiu estis dediĉita memorflaĝeto por ilia laboro en jaro 1953-54.

Poste sekvis la balotado de nova tutŝtata junulara komitato.

Post la voĉdonado konsistas la komitato el sekvaj s-anoj:

Ĉefdelegito-ĉefaj landoj: Kuzník Jaroslav, Rooseveltova 17, Opava

Ĉefdeleg.-slovakaj landoj: Kaczorová Julia, Penzion II č. 204, Svit-Tatry.

Organiza delegito: Kočvara Drahomír, Kamenec 251/5, Ostrava VIII.

Kultura kaj lingva delegitoj - kiel komuna funkcio:

1/ Novobilský Vlastimil, Ústí n/L II - Klíše, Na vlnovce 710/1

/dum lernejjaro skribu al: Praha III, Slezský ústav, Všešrdova 2/

2/ Chlubnová Draga, Charbulova 90, Brno 18.

Regionaj perantoj:

Praha-Liberec-Karlovy Vary: Novotný Vladimír- skribu al adreso: Rychna Zdeněk /por RD/ Grégrova 54 Praha XII.

Č. Budějovice, Plzeň: Křivánek Libor, Zborovská 1332, Písek

Pardubice, Hradec Králové: Franc Karel, Okrouhlík 811, Pardubice II

Brno-Gottwaldov-Jihlava: Werner Jan /u Dr.Remeše/ Helceletova 16, Brno.

Ostrava-Olomouc: Čermák Josef, Bystřínova 3, Otrava VI-Hrabůvka

Slovensko: Arvayová Maria, Penzion II, 204, Svit-Tatry.

La komitato estis kompletigita per du novaj funkcioj, nome ĉefdelegito por Slovakio, kiu zorgos pri la movado en Slovakio kaj funkcio de organiza delegito, kiu zorgos pri la organizado de nia movado en ambaŭ landoj. Tiu ĉi funkcio estas plej grava kaj kun ĉiuj demandoj, kiuj rilatas la organizan aferon, turnu vin al tiu ĉi delegito.

La sistemo de la konkurso restas ankoraŭ la ama kiel antaŭe kaj rajton ŝanĝi kion ajn en ĝi havas organiza delegito, kiu havos senperan konstantan kontakton kun ĉefdelegito. Lia devo estas kontakti kun reg. perantoj kaj helpi kaj konsili en ilia laboro. Ĉia iniciativo en la plibonigado de nia junularmovado estas nun en liaj manoj. Do, kara s-ano, ek al laboro!!!

S-ano Echtner kaj Mařík post la elekto de nova komitato interese parolis pri la Esperanto movado antaŭ kaj post la II-a mondmilito. La interesajojn el iliaj paroladoj estos alportataj en nia cirkulero sur la paĝoj: ELLERNI.

Post la diskuto, dum kiu estis priparolita la kunlaboro kun la TEJO organizo, pri la enhavo de Tagiĝo, pri la divido de regionoj en nia junulara organizo kaj pri aliaj aferoj - ĉefdelegito proklamis jenan rezolucion:

1. Daŭre pliprofundigadi sciojn lingvajn kaj funde ellerni la lingvon.

2. Man en mano kunlabori kun spertaj malnovaj esperantistoj en kluboj.

3. Lokaj delegitoj estas respondecaj pri la aktiva agado de grupo kaj ili ĉiumonate sendados raportojn al regiona peranto.

4. Regionaj perantoj havos konstantan rilaton kun siaj grupoj. Per konsiloj kaj entuziasmigado aktivigi kiel eble plej multe da grupoj en regiono. REPE havos kontakton kun Centrejo ĉefe kun organiza delegito kaj eldonados informan regionan cirkuleron.
5. Ĉiuj membroj de junularaj grupoj helpu en la komuna laboro de sia rondo por Esperanto.
6. Membroj regule vizitadu la klubajn kunvenojn.
7. Zorgema tralegado de junularaj cirkuleroj Tagiĝo kaj Juna Voĉo estu memkomprenebla devo de ĉiuj gesamideanoj.
8. Taŭge propagandu Esperanton kaj ne hezitu per prudentaj vortoj defendi nian aferon kontraŭ niajmalamikoj.
9. Klopodo atingi plej altan lokigon en la junulara konkurso en jaro 1954-55 estu volo de ĉiu grupano.
10. Espero, obstio kaj kuraĝo estu devizo de junularo.

La kunveno estis finita je la 12,45 horo.

"JUNULARO AGU!""JUNULARO AGU!""JUNULARO AGU!""JUNULARO AGU!"


#### JUNULAROJ:

Aŭskultu ĉiumarde kaj vendrede la radio-Esp.elsendojn de Radio Roma sur ondoj 49,92 kaj 31,35m je la 17.50 ĝis 19,10 horo. Vi aŭdos belajn pragramojn, bone aŭdeblajn. Skribu ĉiuj pri via aŭskultado al: Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italio.

-----

#### Granda Esperanta ekspozicio en Opava.

De 18-a de septembro ĝis 2-a de oktobro aranĝas Opava junulara Esp. grupo komune kun filatelistoj, radioamatoroj, fotoamatoroj kaj numismatikoj grandan ekspozicion. Ni invitas esperantistojn, kiuj hazarde veturos tra urbo Opava, viziti tiun ĉi ekspozicion.



Malantaŭ la teatrokurteno.

Do, kaj ni ludas operojn. Bela laboro, ĉu ne vere? Kiam? Hm, en sezono 1953-54. Kie? Tio ne estas grava – ie en nia lando ....

Rirardu ekzemple "Vageman Holandanon" de R. Wagner. Sceno el la tria akto de opero, kiam "ŝipanoj" estas homamasigitaj sur peceto de iu kesto, kiun oni pompe nomas "ŝipo". Muzikobriple ludas, ĥoro, pardonu, ŝipanoj eminente kantas kaj malrapide proksimiĝas la momento, kiam unu maristo el ĥoro havas solkanton. Okuloj de l' publiko estas streĉitaj al scenejo.

Nun!

La muziko ludas plue, sed kantisto silentas. Kio okazis? Dirigento furioze svingas per taktobastoneto kaj ĵetas al ekmutiĝinta solisto fulmajn rigardojn. - Sed tiu ĉi dume trankvile diras al sia najbaro: "Ĉu na ŝajnas al vi, kamarado, ke ĝuste devus esti iu el ni kantanta?!...."

XXXXXXXXXXXXXXXXXX

En hodiaŭa tempo oni jam havas modernan teatroludejan teknikon. Certe. Tamen, se ni ne forgesus malnovajn orajn tempojn, troviĝus ĉe ni enfalejo tute interesa. Iaj ĉi radetoj, rapidumoj, kranko kaj iu, kiu ĝin turnas – tio estas nia belega enfalejo. Tial estos klara, ke ĝi moviĝas nur tiam, kiam iu homo kompleksas turni la kranton.

Kaj nun imagu al vi unuan teatroprezentadon de opero "Diablo kaj Kanjo". Verkis A. Dvořák. Vi certe konas enhavon. En butikoj ekaperos Diablo, vestita kiel ĉarma ĉasgardisto. Li ekdancos kun Kanjo kaj poste kun ŝi malaperas en infero, kompreneble pere de la enfalejo. Li lasos en butikoj nur truon en la planko, sulfuran malodoron kaj tiel simile. Kiam ĉiuj rekonsciiĝos, juna paŝtisto Jirka decidiĝos Kanjon el infero rekonduki. Aŭdace li saltas en tertruon. -- Sed ho ve!

Ektuŝego sur platon de enfalejo, kiu estis preparita eble unu metron sub nivelo de scenejplanko, estis tiel efika, ke ĝi al nenion antaŭsentanta krankturnisto elpuŝis kranton el la mano. Sekve de tergloba gravitacio efektivigis enfalejo reston de sia vojo en multe pli mallongigita tempo. Jirka, kompatinda paŝtisteto kiel viktimo de tiu ĉi esplora veturo, estis kapabla nur ekkrii: "Cifiiiix..." (en libreto tio bedaŭrinde mankas). Pluajn vertojn superbruis energia surteriĝo de enfalejo.

Rezultato: nur malmulta lezaĵo sur maldekstra mano de brava tenoro, kaoso sur scenejo kaj bona amuzado inter la publiko.

Sed tio ankoraŭ ne estas fino. Okaze de unu el sekvantaj prezentadoj havis pro ŝarĝo malagrablajn kun enfalejo Diablo. Li intencis kutime komferte ekaperi en kastelo, sed la sorto decidis alie. Kiam havas Diablo jam kapon super la scenejplanko, tiam ĝi haltiĝis kaj obstine rifuzadis veturi pli supren. Kion fari? Do, kara Diablo devis uzi sian katan facilmovecon kaj kun helpo de brakoj de elrigardantaj kastelaj servistoj elrampi el truo eksteren. Ankoraŭ feliĉe ke dum tiu ĉi momento estas sur scenejo iom pli malhele. Dankojn al lumistoj!

-----

Ĉu ni pripensos la modernan teknikon?

Jes!

Kaj kion pli?

Mi ne scias. - Malsuprenigu la kurtenon!

Nesilentiĝanta aplaŭdo.

Midar Alduk

*\*klarigo de aŭtoro de tiu ĉi artikolo: - por intereso ĉi tiukaze ludis lian rolon bona, sed jam maljuna tenoro, kiu pezas 108 kilogramojn.*

## Ŝipanaj aventuroj

### Kimaniere mi interkonatiĝis kun unua pola samideano.

Tio okazis en tempo, kiam en Polio komencis semajno de strata sekureco. Ĉar en Ŝtetino ne estas tiaj signallumoj sur la krucovojoj, kiajn ni al kutimiĝis vidi en nia lando, okazis ofte akcidentoj. Do unutago sur gravaj krucovojoj lokiĝis policanoj, kiuj montris al loĝantoj kaj veturiloj direkton. Krom policanoj estis sur la krucovojoj ankaŭ radioelsendiloj per kiuj estis malobeemaj irantoj ridindigitaj antaŭ la amaso da homoj, kiuj staris sur la vojoj ĉirkaŭ la krucovojo kaj rigardis tiun ĉi en Ŝtetino nevideblan novaĵon.

Mi vespere ekdormis kaj sonĝis, ke mi eltiris el akvo grandan verdan stelon, kaj tio laŭ malnova sonĝolibro signifas feliĉon. Post vekigo de mateno ĝis malfrua posttagmezo komencis por ni vigla tago. Post la laboro ĉiu dediĉis sian al sia plaĉokupo. La junaj ŝipanoj lavis kaj parfumis sin kaj iris urben al siaj fraŭlinoj, la kapitano foriris al sia familio. La direktilestro prenis sian fiŝĉasilaron kaj iris fiŝi. Mi malsuprenmetis la ŝipeton kaj komencis veturi tra la haveno kaj poste



ankaŭ mi alveturis riveron Odra, kiu tiutempe estis trankvila, nur malgrandaj ondoj suprenlevadis mian ŝipeton. Malrapide returnante mi subite ekaŭdis krion pollingve: "Sinjoro, estu tiel agrabla kaj helpu al mi!" Rigardante en direkto de la kriado mi vidis fiŝkaptiston, kiu ĵetis sian fadenon en mezon de rivero, sed ĝi ĉirkaŭvolvis lignan pilastron, kiu restis en rivero de la ponto. La fiŝisto tiris ĉiudirekte, sed la fadenon li ne povis liberigi. Alveturante pilastron, mi eltiris la fadenon kaj veturis al fiŝkaptisto, kiu tre dankis al mi kaj tuj ofertis el sia cigaredujo la cigaredon al mi. Mi kolektis en mia kapo la polajn vortojn por rifuzi, sed subite elsaltis el mia buŝo Esperante: "Mi dankas, mi ne fumus." Sed jen post mia parolo la fiŝhoko elfalis el manoj de la fiŝisto, li prenis mian manon kaj kriis: "Tamen mi trovis vin. Mi serĉas s-anon de tempo, kiam mi translokiĝis al Stetino, sed sensukcese. Tamen hodiaŭ mi trovis homon, kun kiu mi povas verde paroli, vizitu min, estu mia gasto." Lia parolado estis preskaŭ senfina. Nun de tempo al tempo vi povas sur rivera akvo de Odro vidi malrapide veturi la ŝipeton kaj en ĝi strangan duopon da homoj. Unu malantaŭe remas kaj dua sidas en mezo kaj fiŝas. Ili parolas silente por ne timigi la fiŝojn kaj ambaŭ pliperfektigas en Esperanto.

Sek

### ELLERNI 3

#### Argumentoj por Esperanto.

Por Tagiĝo kompilis kaj tradukis Jaroslav Mařík laŭ tiuj ĉi fontoj:

- I. Vypowiedzi ludzi wybitnych o języku międzynarodowym. Opracował I.D.  
Na prawach rękopisu.-- Eld. Związek Esperantystów w Polsce, Zarząd Główny, Warszawa.  
(N-roj: 1,11,13,14,15,19,22,23)
  - II. Historio de E. Drezen, 2. esp. vydání; Leningradský historickolingvistický ústav.  
Vyd."Ekrelo", Leipzig, 1951./nroj:2,5,6,10,15
  - III. Vidu ĉe koncernaj eldiroj.
    1. V. I. Lenin – "Ani jediné výsady ať nemá žádný národ, žádný jazyk!"  
("Dělnická třída a národnostní otázka", sv. 19, str. 172, rus. vyd. r. 19 48).
    2. RESOLUCE II. SJEZDU PRVNÍ INTERNACIONALY, které předsedali Marx a Engels.  
/Lausanne r. 1867)  
"Sjezd se domnívá, že světový jazyk a reforma pravopisu by byly všeobecným dobrodiním a přispěly by velkou měrou k sjednocení a sbratření narodů."
- Časopis "La Rondo", č..39, sv. 8, list.1950, Melbourne, Australie, v článku: "Karel Marx a umělé jazyky", přeloženem z italského článku v "L'esperanto", březen 1950, orgánu Itala Esperanto Federacio,. Torino, uvádí tento argument takto /přeloženo z Esp./: "S plným souhlasem Marxe druhý sjezd První internacionály dělníků, konaný v Lausanne r. 1867, usnesl se na této resoluci: "Sjezd se domnívá, že světový jazyk a úprava pravopisu by přinesly všeobecný prospěch a pomohly by k rychlejšímu dosažení jednoty a bratrství národů."
3. VLADIMÍR ILJIČ LENIN.  
"Esperanto je latinou proletariátu a doufám, že svou ideální lehkostí účinně urychlí dorozumění celého světa." "Esp. Slovaka", č. 10-11, 1949
  4. ČLENOVÉ FRANCOUZSKÉ AKADEMIE VĚD  
"Esperanto je mistrovské dílo logiky a jednoduchosti."  
/Z prohlášení 21 členů FAV v Paříži r. 1921/
  5. L.L.ZAMENHOF - iniciátor Esperanta /  
"Snad pro nikoho na světě nemá náš demokratický jazyk takové důležitosti jako pro dělníky a doufám, že dříve či později bude dělnictvo nejsilnější oporou naší věci. Dělníci nejen poznají užitečnost Esperanta, ale oni také více než jiní vycítí podstatu a myšlenku esperantismu." - /Z dopisu redakci "Laborita Esperantisto" (Dělnický esperantista) r. 1910../
  6. ZAMENHOF - "Obava, že mezinárodní jazyk zničí jazyky národní, je stejně směšná jako

- obava, že pošta, která umožňuje dopravu zpráv mezi lidmi, učiní zbytečnými ustní rozhovory.
7. W.E.GOLLINSON - profesor germanistiky na universitě v Liverpoolu.  
"Věřím ve vhodnost Esperanta pro mezinárodní styky poválečného světa.  
Autor esperanta, polyglot, který se narodil uprostřed Slovanů, dovedl výborně prositi právě mezinárodní prvky od falešných." (Z dopisu J. Maříkovi).
  8. "Abychom udrželi mír, je třeba spojit všechny tvořivé síly a pomáhat dorozumění mezi všemi národy světa. - ANTONÍN ZÁPOTOCKÝ, předseda čsl. vlády, 15.7.1951 /Rudé právo, 17.7.1951)
  9. MAO CE - TUN - president a zakladatel Čínské lidové republiky.  
"Esperanto nejen zasluhuje, abychom se mu učili, ale je i třeba se mu učit, budeme-li ho používat pro opravdový internacionalismus a pro revoluci." (Z listu redakci "Jen-an Esperantisto" v prosinci 1939/  
/"El Popola Ĉinio, Ŝanhaj, č. 4/1951/
  10. ANTONÍN ZÁPOTOCKÝ v petici k OSN.  
Domnívám se, že otázka mezinárodního jazyka je věc tak vážná a praktická, že by ji měla Organizace spojených národů podrobiti ihned vážné úvaze. Domnívám se, že světový pomocný jazyk, který bude národní jazyky doplňovati, ne nahrazovati, je nutný, aby usnadnil styky mezi národy a urychlil pokrok.  
Vzhledem na světové užívání esperanta, jediného z umělých jazyků, který se rozšířil v rozsahu hodném pozornosti, doufám, že Spojené národy pomohou rozšiřovati užívání tohoto jazyka všemi prostředky, na příklad vyučováním na školách, kde jsou proto vhodné učitelé, používáním v turistice, mezinárodním obchodu a korespondenci.
  11. KAREL MARX - zakladatel vědeckého socialismu.  
"U každého soudobého vyspělého jazyka se řeč, živelně zrozená v pravěku, povznesla na úroveň národní řeči - jednak, díky dějinám jazykového vývoje, z materiálu již hotového, jak to pozorujeme u románských a germánských národů, jednak díky smíšení národů, jako u angličtiny jednak zásluhou soustředění nářečí u některého národa, což se děje na základě hospodářského a politického soustředění.  
Jest samozřejmé, že jednotlivci budou jednou schopni v plné míře kontrolovat tento produkt lidského pokolení."
  12. EUGENIE COTTONOVÁ – předsedkyně Mezinárodní federace demokratických žen, místopředsedkyně Světové rady míru, laureátka mezinárodních Stalinových cen míru. - za upevnění míru mezi národy.  
"Používání mezinárodního pomocného jazyka by přineslo veliký užitek všem mezinárodním sjezdům. Na těchto sjezdech jsou připuštěny nejvýše čtyři úřední jazyky a delegáti asi ze čtyřiceti sdružených zemí jsou nuceni učit se úřednímu jazyku, aby jim rozuměla část posluchačů. Kdybychom se však naučili lehkému jazyku jako je esperanto, celý svět by se dorozuměl.  
Jest mým přáním, aby se několik žen z různých zemí usneslo, že se naučí esperantu a aby podaly důkaz na jednom z příštích sjezdů, že je tu možnost dorozumění. Tím se posílí přátelství mezi ženami celého světa, což jest jedna z našich nejdražších tužeb."  
/Z rozhlasového projevu u příležitosti pražského sjezdu MFDŽ r.1947/  
(Interview: J. Mařík)
  13. MATYÁS RÁKOSSI – generální tajemník Maďarské dělnické strany, náměstek ministerského předsedy Lidové republiky maďarské.  
"Jazyk esperanto mám velmi rád a vysoce si ho vážím."  
/Z listu maďarským esperantistům/
  14. ISTVÁN KOSSA - ministr práce Lidové republiky maďarské. "K dosažení kulturního rozvoje dělnické třídy, k uskutečnění svobody národů, k dosažení míru mezi svobodnými národy, k budování demokratického Maďarska, jakož i k ustálení mezinárodních styků nového Maďarska je nám konečně potřebný pomocný jazyk esperanto.

15. ALEXANDER E. FERSMAN (1885 - 1945) president Akademie věd SSR

"Esperanto jest nejuvažnějším pokusem o vytvoření umělého jazyka, společného pro všechny národy. Vědečtí pracovníci celého světa, spatřující další pokrok vědy v rostoucím sjednocování širokých mas lidu musí vřele přijmout esperanto jako jednu z cest, vedoucích k posílení a rozšíření tohoto sjednocení.